


HUNGARA FERVOJISTA MONDO



Esperanto, Internacia lingvo



La elektita estraro de IFEF por la
venontaj tri jaroj

3
----- 63-a jarkolekto
2019



HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado
en Hungario

Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

Respondeca redaktoro:

István Gulyás

Eldonas:

Hungara Fervojista Esperanto-Asocio

Hungara Sekcio

de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

Poŝta adreso: HU-1155 Budapeŝt

Rákos út 98. I/9.

Aperas kvaronjare

Abonprezo: al hungara adreso: HUF 2000

al eksterlanda adreso: EUR 12

*

MAGYAR VASUTAS VILÁG

A magyar eszperantista vasutasok
központi lapja

Felelős szerkesztő: Gulyás István

Kiadásért felelős

A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület

„Szkenguru” Nyomda Budapest

Felelős vezető: Balla László

ISSN 0230-323x

ENHAVTABELO:

42. **I. Gulyás:** Elektroj
43. **L. Gabalda:** La 71-a IFEF-kongreso
45. **M. Pintér:** Kongresaj mozaikoj
49. **J. Tomíšek:** El fervoja mondo
50. **M. Eszes:** Raporto pri la ekspozicio
53. **J. Tomíšek:** Originaleca mondo de albanaj fervojoj
56. **M. Benc:** Trajnvojaĝo en Kroatio
57. **L. Molnár kaj J. Farkas:** Kvindek jaroj de Budapeŝta Medicina E-Fakgrupo

63-a jaro N-ro 3, JULIO - SEPTEMBRO

ELEKTOJ

Nuntempe en la tuta mondo, kaj en multaj kontinentoj eĉ landoj okazas elektoj por diversaj ŝtataj, profesiaj aŭ sociaj postenoj. Tiuj elektoj antaŭenigis longajn politikajn batalojn, kiam la kandidatoj konkuras unu kontraŭ aliaj. Se la bataloj estas honestaj ĉio estas en ordo, kaj venkas tiu kandidato, kiu estas la plej taŭga. Sed preskaŭ nenie okazas honestaj konkursoj, ĉar la konkursantoj promesas ĉion antaŭ la elekto, kion ili ne povas plenumi se oni elektas ilin. Eĉ multaj partoprenantoj surĵetas kontraŭulojn per koto kaj ŝlimo, kaj en fremda okulo ili vidas la spliton, en sia okulo ili ne rimarkas la trabon. Tio estas vera diro. Tiuj bataloj donas multajn malgajajn rezultojn, kaj multaj novaj posteuloj kaŭzas trompiĝojn al la elektantoj. Kelkaj kandidatoj ne havas memkonon, kaj ili ne povas reale kritiki la proprajn kapablecojn kaj fortojn. Ankoraŭ ili ne demandis de si mem, ke „Ĉu mi povas doni konvenan respondon al la solvo de la taskoj?”

Bedaŭrinde en la Esperanto-movado ni ankaŭ trovas tiujn kandidatojn. Se ni rigardas la novajn elektitajn esperantistojn en la landoj aŭ asocioj, ni devas konstati la malgajan realon. Mi volas ofendi neniun, kaj mi esperas, ke ĉiuj elektitaj eĉ elektotaj kandidatoj plenumas siajn taskojn. En la kadro de UEA okazos en la sekva Universala Kongreso estrarelekto (preskaŭ ĉiuj estas novaj kandidatoj), elektoj de „C” komitatanoj, komitata reviziantoj kaj membroj por la Komisiono pri Financo. Mi esperas ke la plej grava Esperanto pinto-organizaĵo retrovos la plej taŭgajn membrojn por tiuj postenoj.

Mi estas plene kontenta pri la elektitaj estraranoj ĉe IFEF dum la IFEF-kongreso en Malago, kaj mi esperas, ke ili efektigos la plej gravajn taskojn: fortigi kaj disvolvigi la fervojistan Esperanto-movadon.

En Hungario okazos en la venonta jaro estrarelekto. Mi ne scias, ke el la trimembra estraro kiuj volas rekandidatiĝi, sed nun estas la plej grava tasko serĉi taŭgajn fervojistajn esperantistojn por plibonigi la agadon en la kadro de la hungara fervojista Esperanto-movado.

István Gulyás

LA 71-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO

3. - 9. majo 2019

En Andaluzio en la urbo Malago situanta ĉe la Marbordo de la Suno okazis eĉ tri kongres-aranĝoj komence de majo. La 78-a Hispana Kongreso, la 21-a Andaluzia Kongreso kaj la 71-a IFEF-Kongreso. La eventojn partoprenis ĉirkaŭ 170 geesperantistoj el 22 landoj. La plej foraj partoprenantoj venis el Brazilo, Ĉinio, Japanio, Koreio, Meksiko. Regis tre agrabla internacia etoso.



Partoprenantoj de la kongreso

La unua IFEF-kongreso en Hispanio okazis en Barcelono en la jaro 1909. La ĉefa kialo elekti Hispanion kiel kongreslandon estis deziro festi tie la 110-an jubileon. Al tio forte strebis la prezidantino de IFEF Rodica Todor. Ŝi sukcesis konvinki esperantistojn en Malago, ke ili organizu la kongreson en sia lando. La elekto estis bona; agrabla ĉemara urbo, bela suna vetero, konvena kongresejo en Dioceza Domo, kie ĉio okazis sub sama tegmento.

La programo estis varia kaj riĉa je diversaj prelegoj, atelieroj, ekskursoj kaj artaj vesperaj programeroj. La inaŭguro okazis en granda salono kun partopreno de la reprezentantoj de ĉiuj asocioj. HEF (Hispana Esperanto-Federacio) estis reprezentata de Tonyo del



La grupo "Kajto" amuzis nin per Esperanto-kantoj

Barrio, AEU (Andaluzia Esperanto-Unuiĝo) de Ángel Arguillos kaj IFEF de Rodica Todor. Ĉeestis ankaŭ reprezentanto de UEA kaj la urba skabenino pri kulturo. Post bonvenigaj vortoj kaj salutoj de reprezentantoj de la partoprenantaj landoj, la kongreso estis malfermita. Poste okazis komuna fotado.

Inter la partoprenantoj ĉeestis eminentaj personoj: Margareta Zaleski-Zamenhof, pranepino de L.L. Zamenhof, Seán Ó Riain irlanda diplomato en Vieno, Katalin Kováts, fakulino pri lingvistiko kaj Esperanto-instruado, Federico Gobbo doktoro pri

informadiko kaj komunikado kaj du estraranoj de UEA - por nomi nur kelkajn.

Okazis ĝeneralaj, fakaj, komitataj kaj estrar-kunsidoj, estis priparolataj movadaj aferoj kaj strategio pri la estonteco de IFEF. Estis elektita nova estraro por tri-jara periodo. Interesis nin prelegoj rilataj al fervojo: "La AVE (hispana grandrapida trajno) al Mekko", "Hyperloop" (morgaŭa fervojo), "Veturado tra la interplaneda spaco", "110-a jariĝo de la internacia fervojista movado". Surpriza estis sciigo pri projekto de Esperanto-stacio en forlasita stacidomo *Halbe* ĉe Berlino. Estis prezentataj venontjaraj kongres-lokoj. IFEF kongresos en Germanio en *Frankfurt an der Oder* kaj en pola urbo *Stubice* situanta trans ponto ĉe la germana limo. Samtempe okazos la germana kaj la pola kongresoj.

Interesaj estis debatoj kaj prelegoj pri diversaj temoj, inter kiuj: "La angla lingvo en la Eŭropa Unio post la Briteliro", "Projekto Erasmus", "Kiujn fremdlingvojn oni instruas en EU?", "La homo sur la Luno", "Ĉu EU vere havas 24 oficialajn lingvojn?", "Enkonduki Esperanton kiel oficialan lingvon ĉe EU". Esperantan Katedron en la Amsterdama Universitato prezentis Federico Gobbo, pri la projekto "Esperanto plaĝo" en hispana ĉemara urbo *Cullera* parolis Dennis Keefe.

Krome okazis ateliero pri informadiko, pri arĥivado kaj pri mikro-rakontoj. Eblis partopreni Esperanto-kursojn kaj KER-ekzamenojn. Pri la libroservo zorgis Mariló Torres kaj Conchi Fernández. Pri aŭkcio okupiĝis Tonyo del Barrio, Katalin Kováts kaj Margareta Zaleski-Zamenhof. Vendiĝis ĉiuj proponataj objektoj por la profito de la kongreso. En la loka ĵurnalo "La Opinión de Málaga" aperis ampleksa artikolo kun fotoj pri la kongreso kaj pri Esperanto.



Timigaj rokoj ĉe urbo Rondo

Tuttagaj ekskursoj gvidis nin al urboj Rondo, Granada, Kordovo kaj *Madinat al-Zahra*. Duontaga ekskurso celis la urbon *Antequera*. Plaĉa estis faka ekskurso al fervojlinio en *Zafarraya*, kie ni ĝuis veturon en trajneto tirata per eta vaporlokomotivo. Ne mankis urbovizitado al Malago kaj al ĝia bela botanika ĝardeno.

Dum la semajno okazis abunda, tre varia kaj altkvalita muzika kaj arta programo. Vesperan programeron "Vivu la teatro" reĝisoris Miguel Fernández kaj Ana Manero.

Andaluzian muzikon ni ĝuis kun Rocío Alba, Pedro Carrillo kaj Concerto Málaga. Per Esperanto-muziko kaj kanzonoj regalis nin Grazia Barboni, Kajto kaj per ciganaj kantoj Saša Pilipović. Li ankaŭ impone kaj profesie prezentis monodramon pri Galileo.

Ĉe la fermo estis transdonita la IFEF-flago al la reprezentantoj de Germanio, kie okazos la transponta Esperanto-kongreso: germana, pola kaj fervojista de la 29-a de majo ĝis la 5-a de junio 2020. Vi estas invititaj partopreni ĝin.

En ĉi-kongreso ni ĝuis emociplenajn momentojn, internacian kaj amikeman etoson. Koran dankon al niaj andaluziaj samideanoj kaj al iliaj kunhelpantoj pro agrabla semajno en Malago!

Ege interesa estis la tritaga postkongresa ekskurso al norda Maroko, kiun ĝuis kvardek tri gesamideanoj. Ni traveturis la urbon Ceuta kaj vizitis la urbojn Tetouan, Asilah, Tanger kaj Chaouen.

Liba Gabalda

KONGRESAJ MOZAIKOJ

En la hispana urbo Malago okazis la 71-a IFEF-kongreso inter la 3-a kaj 9-a de majo 2019. Estis interesa novaĵo, ke ne nur la fervojistaj esperantistoj kongresis tie, sed okazis „La triopa kongreso” kun la Hispana Esperanto-Federacio (HEF) kaj la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo (AEU). Entute partoprenis 170 personoj, el kiuj 83 kongresanoj flanke de IFEF, 52 flanke de HEF kaj 35 flanke de AEU. La kongresejo estis la impona „Casa Diocesana”, kiu estas edukcentro por teologoj. Estis ege bona afero, ke en tiu domo okazis ĉiuj kongresaj programoj, eĉ ankaŭ tie loĝis la kongresanoj dum la kongresa semajno.

Vojaĝo al la kongreso



Partoprenantoj de la „Triopa Kongreso”

Mi startis el Budapeŝto la 2-an de majo per aviadilo frumatene al Frankfurt am Main, kie mi devis atendadi preskaŭ dek horojn. Tiun longan tempon mi pasigis per legado kaj promenado en la flughaveno. Poste mi flugis al la hispana urbo Alicante kaj de tie al Madrido. Tie mi devis restadi preskaŭ ĝis frumatene de la sekva tago, kiam mia aviadilo startis al Malago. Dum la atendado mi provis iomete dormi sur la malkomforta fotelo, sed la tempo forpasis ege malrapide. En Malago mi spertis, ke la flughaveno estas vere

suda, kolora, laŭta kaj alloga. Do la vojaĝado al la kongreso estis tro komplika kaj laciga. Dank' al Dio, ke en la flughaveno Malago mi rapide trovis tiun aŭtobuson, per kiu mi rekte povis atingi la kongresejon. Mi jam antaŭen timis pro la revojaĝo al Budapeŝto, sed tiu refugo forgesigis la lacigon de la alvojaĝo.

Kongresurbo Malago

Tiu urbo situas en la sudo de Hispanio. Ĝi havas 570 mil enloĝantojn, kaj estas la ĉefurbo de la „Marbordo de la Suno” (Costa del Sol). La ekonomio de Malago baziĝas sur la turismo kaj komerco, pro tio la urbo estas unu el la plej vizitataj urboj de Hispanio. Urbon Malago fondis la fenicoj en la 8-a jarcento a.K., kiun atestas multaj restaĵoj de la antikva greka koloniado. Poste sekvis la romia epoko, kiun prezentas la konservanta teatro el la unua jarcento p.K.. Post la disfalo de la Roma Imperio la barbaroj kaj bizancanoj okupis la urbon, sed ili ne lasis daŭrajn restaĵojn. Dum la 8-a jarcento venis la islamanoj, kiuj kreis kaj konservis dum ok jarcentoj tipan islaman urbon. En la fino de la dekkvina jarcento la katolikoj konkeris la urbon kaj aneksis ĝin al la Kastilia Regno. Ekde tiam Malago daŭre restas kristana loko, kies evoluo sekvas tiun de la Regno de Hispanio ĝis la hodiaŭaj tagoj. Intertempe Malago iĝis la dua plej industria urbo de la tuta Hispanio, ĉefe pro la tekstila

industrio. En la urbo troveblas multaj famaj parkoj, promenejoj kaj botanika ĝardeno. La publikaj konstruaĵoj, preĝejoj, monumentoj kaj statuoj, la trafiko kaj la statoj de la urbaj vojoj prezentas la riĉecon de la urbo. En la urbo troveblas pli ol tridek muzeoj. En tiu medio praktike kaj plaĉaspekte alĝustiĝis la Casa Diocesana, nia kongresejo.

Inaŭguro, kusidoj kaj aliaj oficialaj programoj

La *solena inaŭguro* okazis en granda salono de la kongresejo, kie ĉeestis pli ol cent kongresanoj. Sur la podio sidiĝis la reprezentantoj de la tri asocioj, la delegito de UEA, la urba skabenino pri kulturo, kiuj ĉiuj salutis la kongreson. Ankaŭ partoprenis en la inaŭguro kelkaj konataj esperantistoj, inter tiuj la pranepino de Zamenhof, Katalin Kováts lingvisto de Esperanto, Seán O'Riain diplomato kaj aliaj. La reprezentantoj de la landaj asocioj salutis la kongreson, inter ili Márta Pintér transdonis al la kongreso la bondezirojn de la hungaraj fervojistaj esperantistoj. Post la inaŭguro okazis komuna fotado ĉe la enirejo de la kongresejo.

La *publika komitatkunsido* de IFEF estis riĉenhava kaj tre interesa. La estraranoj raportis pri la 2018 jaraj agadoj de siaj fakaj terenoj. La komitatanoj aprobis per voĉdono la plej gravajn decidojn, kaj difinis la taskojn por la sekvaj periodoj. Unu el la plej gravaj temoj estis la kasraporto kaj bilanco por la jaro 2018, kaj la buĝeto por 2020. Ankaŭ estis mallonga diskuto pri la nuna situacio kaj estonto de IFEF, ĉefe pri la agadoj de la laborgrupoj.

Dum la kunsido okazis estrarelekto por la venontaj tri jaroj. La rezulto estas: prezidantino: Rodica Todor (Rumanio), sekretario: Vito Tornillo (Italio), Kasisto: Laurent Vignaud (Francio), redaktoro: Ladislav Kovar (Ĉeĥio). gvidanto de la Faka Komisiono: Jan U. Niemann (Danio). La komitato akceptis la proponon pri la venontjara IFEF-kongreso, kiu okazos en Germanio en urbo Frankfurt an der Oder kaj en Pollando en urbo Slubice. Do du landaj asocioj entreprenis la taskon organizi la 72-a IFEF-kongreson fine de majo 2020.



Tipa strato en Malago

Por la jaro 2021 anoncis sin Ĉeĥio, kaj por 2022 Belgio.

En la kadro de la *kunsido de la Faka Komisiono* la fakuloj traktis 11 tagordpunktojn. La plej interesa temo estis la kontrakto inter la transporta fako de la Universitato Jan Perner en la ĉeĥa urbo Pardubice kaj IFEF. Tie okazis prelegseminario en februaro 2019. Ankaŭ estis grava temo, ke la morto de Heinz Hoffmann la nova sekretario de la Terminara Sekcio iĝis Guido Brandenburg. Fine la partoprenantoj decidis pri la taskoj de la du sekcioj de la Faka Komisiono.

Dum la kongreso okazis multaj *fakaj prelegoj* pri fervojaj temoj, kiujn la Faka Komisiono organizis. Inter la prelegoj mi mencias kelkajn: Jan U. Niemann: Konstruprojekto Koge Kyst; Ladislav Kovar: Kompletaj informadservoj; Ladislav Hakl: Bicikla trafiko kaj fervojo; Zlatko Hinst: Baza koncepto de trafiko en urba laŭmezure de la homo; Rodica Giuhat: La fervojo inter Anina kaj Oravita; Laurent Vignaud: Ateliero pri informadiko; Jan U. Niemann: Ateliero pri arkivado. Okazis multaj interesaj prelegoj flanke de HEF kaj AEU.

Kulturaj programoj

Ĉiu vespere okazis kultura programo dum la kongresa semajno – escepte kiam okazis tuttaga ekskurso. La programoj estis variaj kaj interesaj eĉ altkvalitaj.

La „*Concerto Málaga*” konsistas el sep violonoj, du kontrabasoj, du ĉeloj, duobla basoj kaj klavikordo.



La Moskeo-Katedralo en Córdoba

Tiu ĉambro-muzika orkestro ludas en internacia kvalito kaj interpretas ĉefe hispanan muzikon preskaŭ en la tuta mondo. Ili ricevis multajn honorigojn, kaj la kongresanoj povis sperti pere de la programo, ke tiu orkestro vere meritis la honorigojn.

La grupo „*Kajto*” jam estas malnove konata grupo al la fervojistaj esperantistoj, ĉar ili – Ankie kaj Nanne – jam multfoje rolis en diversaj Esperanto kongresoj. Ili faris koncert-turneojn tra multaj landoj ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en Ameriko, Aŭstralio kaj Azio. Ili

grave kontribuas al la Esperanta muzik-kulturo. La grupo *Kajto* sin akompanas per diversaj instrumentoj kiel gitaro, mandolino, ŝalmo kaj koncertino. Dum la kongresa semajno ili dufoje koncertis kun grandaj sukcesoj.

„*Maria Grazia Barboni*” ankaŭ estas konata por ni, ĉar ŝi koncertis en pluraj esperantaj aranĝoj en Italio kaj en IFEF kaj UEA kongresoj. Ŝi prezentis kanzonojn de Fabrizio De André, Edith Piaf, Joan Baez kaj de aliaj aŭtoroj. Ŝi havas belegan organon, kiu voĉo ravis la aŭskultantaron. Ŝi belege ludis per gitaro eĉ per akordiono.

„*Saša Pilipovic*” estas profesia aktoro, kiu jam 32 jarojn ludas sur esperanta scenejo. Li kunlaboris kun Vida Jerman kroata artistino, Georgo Handzlik kaj kun multaj artistoj kaj esperantaj verkistoj. Li ludis en la tuta mondo, kaj en la lasta UK en Lisbono li faris koncerton de cigantaj kantoj. Tiun programon li prezentis en Malago.

„*Rocio Alba*” estas unu el la plej gravaj nuntempaj artistoj ene de la hispana muzika sceno. Akompanata de sia gitaristo ŝi surprizis nin kantante muzikan stilon kun flamenka melodio. Ŝi elstaris pro sia eleganteco, sia unika arto, sia bela voĉo kaj sia kapablo kiuj kvalitoj donis kaj certigis la sukceson al la publiko.

Mi povas konstati, ke la kongresajn vesperojn agrable pasis helpe de la altnivelaj kulturaj programoj.

Ekskursoj

Inter la kongresaj programoj la kongresanoj ĉiam atendas kun grandaj interesoj la ekskursojn. En la kadro de la 71-a IFEF-kongreso okazis du urbovizitadoj, du duontagaj kaj du tuttagaj ekskursoj. Inter la *urbovizitadoj* estis la plej memorinda la vizito de la *Botanika Ĝardeno*. Tiun belegan vidindaĵon estigis la nobela familio Markizoj de Loring meze de la 19-a jarcento. Ĝi estas taksata kiel la plej grava tropika ĝardeno en Hispanio, kaj unu el la plej gravaj el la tuta Eŭropo. En la ĝardeno troveblas multspecaj palmoj, bambuoj, fikuso, florantaj verdaĵoj ktp. En la ĝardeno troviĝas malgranda muzeo kun romiaj mozaikoj, statuoj kaj arkeologia ekspozicio. Belaj pontoj, riveretoj, fontanoj kaj diversaj belvederoj beligas tiun ĝardenon.

El inter du *duontagaj ekskursoj* mi elektis la viziton de urbo *Antequera*, ĉar bedaŭrinde la alia duontaga ekskurso okazis samtempe, kaj pro tio mi devis elekti. Antequera estas grava urbo, kiu situas je 45 km-j for de Malago. La loĝantaro atingas pli ol 40 mil homojn. La urbo kuŝas sur ebenaĵo en valo flankita de du montoĉenoj. La plej alta monto havas 880 metrojn. En urbo troveblas 33 preĝejoj, pro tio oni nomas ĝin „urbo de la preĝejoj”. Ĝi estas loĝata antaŭ pli ol 5000 jaroj, inter ili neolitikaj prahomoj, keltoj, fenicoj, kartagenoj kaj romianoj. Poste dum la 8-a jarcento la urbo estis konkerita de la islamanoj, kies regado daŭris 7 jarcentoj. En la jaro 1410 la Kastilia armeo rekonkeris la urbon, kaj de tiam ĝi iĝis pli kaj pli grava pro la ekonomia kaj komerca aktivaĵoj. Multaj riĉaj nobeluloj alvenis al la urbo, kaj ili konstruigis imponan monumentan heredaĵon, pro tio troveblas en la urbo multajn renesancajn, barokajn kaj novklasikajn mirindaĵojn.

Mi partoprenis ambaŭ *tuttagaj ekskursoj*. La unua kondukis nin al urbo *Ronda*. La urbo



La romia ponto sur la rivero Guadalquivir

estas unu el la plej antikvaj urboj de Hispanio. Ĝi devenas el la neolitika erao laŭ arkeologiaj malkovroj realigitaj en ĝia malnova urbo-centro. La plej interesa vidindaĵo estas la Nova Ponto, kiu estas 90 metrojn alta, starigita sur konstruĵoj eltirataj el la fundo de la gorĝo de la rivero Tajo. La alia vidindaĵo estas la preĝejo Sankta Maria la Mayor. Antaŭ la estiĝo de ĉi tiu preĝejo sub la islama regado en sama loko oni starigis plej grandan moskeon de la Medino. Post la katolika konkero de la urbo sur la loko de la moskeo komenciĝis

la konstruado de la nuna preĝejo. La gotika stilo estis reprezentita en ĝiaj tri navoj. En 1580 okazis tertremo, kiu detruis parton de la preĝejo, kaŝante la gotikan purecon. La tria plej interesa vidindaĵo estas la torejo de Ronda pro ĝia historio kaj arkitekturo, karaktero kaj beleco. Ĝi estas unu el la plej antikvaj de Hispanio, kaj unu el la plej monumenta en la mondo.

La alia *tuttaga ekskurso* okazis al urbo *Córdoba*. Ĝi situas en la suda regiono de Andaluzio je la bordo de la rivero Guadalquivir, kaj enhavas 320 mil loĝantojn. Ĝi havas plurmil jaran tre riĉan historion. La historio de la urbo komencis kun la fenicoj, poste venis la romianoj, gotoj, maŭroj kaj fine la hispanoj. Ĉiu epoko postlasis multajn memoraĵojn kaj postsignojn. Rimarkinde estas, ke dum la romia epoko Córdoba estis la naskiĝloko interalie de la filozofo Seneca. La urbo fariĝis ĉefurbo de la sendependa kaliflando dum la araba epoko, kaj unu el la ĉefaj sidejoj de la monda kulturo kun figuroj la filozofo Ibn Ruŝd kaj la juda medicinisto Maimonides. Nuntempe la urbo estas unu el la plej gravaj andaluzaj centroj pro sia kultura heredaĵo kaj grava fervoja nodo. Ĝia centro estas Monda Kultura Heredaĵo de Unesko. En ĝi plej elstaras la araba Moskeo, kiu post la falo de la araba epoko fariĝis Katedralo, nun konata kiel Moskeo-Katedralo. Alia grava monumento estas la romia ponto, kiu transigas super la rivero Guadalquivir kaj ankoraŭ estas uzbla. Ege ĉarmaj kaj belegaj la tipaj kordobaj kortoj (patios) pro la mirinde ornamitaj floroj. Tiu ekskurso estis neforgesebla por mi.

Mi partoprenis en la tritaga postkongreso al Maroko, sed pri tiu interesa kaj ankaŭ neforgesebla vojaĝo mi raportos en la sekva numero de tiu ĉi revuo.

Márta Pintér

EL FERVOJA MONDO

Aŭstrio: Aŭstra fervojreto ĝis jaro 2030 fariĝu tute elektrizita

La tuta fervojreto de Aŭstraj Federaciaj Fervojoj (ÖBB) en longo 4836 km fariĝu ĝis la jaro 2030 tute elektrizita. Anoncis tion federacia ministro de trafiko *Norbert Hofer (FPÖ)* en la Parlamento en Vieno. Elektrizado estos financata el buĝeto, kiel estas planata. La ministro samtempe parolis pri preparata privatigo kaj ĝia okazado, tamen inter partioj estas diversaj opinioj, kiam ekzemple *FPO* dume kondukas sindeteneme.

(Laŭ *Transportweb*, 9.11. 2018)

Ĉeĥio: Servoj por handikapitoj en trajnoj

Problemoj kun transporto de homoj kun malaltigita moviĝa kapablo kaj orientiĝo apartenas por nacia fervoja trafikisto al tiuj prioritataj. Al vojaĝantaj personoj kun malaltigita movebleco tial Ĉeĥaj Fervojoj ofertas multajn priservojn, kiel ekzemple *veb ČD* modifita por personoj kun perturboj da vidkapablo, prizorgon de helpanto por enrajnigo, preferan rezervigon de sidlokoj en trajnoj, multifunkciajn pasaĝervagonojn kun platformo por ĉareloj, basplankajn elektrajn kaj motorajn veturilojn aŭ veturilkompleksojn kun instigvidaj avertiloj en centoj da veturiloj, senbarierajn necesejojn aŭ unikan rezervadsistemon destinita al ĉaruloj rekte sur *vebpaĝo ČD*. Pli ol 75% el ĉirkaŭ 7200 ĉiutage trafikantaj trajnoj de Ĉeĥaj Fervojoj sukcesas nun komferte transporti handikapitajn personojn. La nacia trafikisto kun evoluo de ĉi tiuj servoj preparas ankaŭ enkadre de ofertoj en publikaj konkursoj por prizorgi trafikon en regionoj en la jaro 2019.

(Laŭ *ČD pro vás* 1.2019)

Germanio: Vartransporto sur DB Netz kreskis

Laŭ indikoj de Federacia Statistika Ofico (*Destatis*) estis en la jaro 2017 sur reto *DB Netz* transportitaj 401 milionoj da vartunoj, kio prezentas interjaran plikreskon + 0,5%. Transporta povumo atingis 129,4 miliardojn da tunokilometroj, per kio ĝi superis kvanton de la jaro 2016 pri 0,8%. La meznivela transporta distanco tiel plikreskis al 323 km. La novaj kompletaj indikoj de *Destatis* jam entenas ĉiujn vartrafikistojn sur reto de publikaj linioj, dum pli frue anocataj portempaj indikoj entenis nur grandajn trafikistojn kun pli vasta anonca devo sur monata bazo. Simpligitan anoncan devon sur jara bazo havas trafikistoj, ĉe kiuj entuta kvanto de vartrafiko ne superas 200 milionojn da tunokilometroj kaj ne superas 200 mil tunojn en jaro.

(Laŭ portalo *Eurailpress.de*)

Italio: Unua altrapida vartrafika linio en la mondo

Ekde 7. 11. 2018 estas ekspluatata la unua vartrafika linio en la mondo. Temas pri nokta trajnkunligo, kiam en 3 horoj kaj 30 minutoj estas transportata varo inter terminalo *Mercitalia* en *Maddaloni – Marcanise (Caserta)* kaj vartrafika centro en *Bologna*. La trajnkunligo estas ekspluatata ekde lundo ĝis vendredo. Por trafikado estas uzata altrapida trajnunuo *ETR 500* kun 12 veturiloj, kio egalas al kapacito de 18 ŝanĝeblaj duonremorkoj. La vartrajno dum nokto sukcesas plenumi ambaŭ direktoveturojn. Ekspluatanto de la trajno estas *Mercitalia Fast*, kiu estas filia kompanio de FS, kaj kiu havas al dispono la plej modernajn lokomotivojn kaj vagonojn. *Mercitalia* planas plivastigon de ĉi tiuj altrapidaj trajnkunligoj por la tuta Italio

(Laŭ *Transportweb* 9.11.2018)

Preparis: **Jindřich Tomášek**

Raporto pri la ekspozicio „Kontakto de Esperanto kaj la Arto”

János Nagy vicprezidanto kaj afergvidanto de la Hungaria Esperanto-Asocio (HEA) sonĝis grandan aferon. Lia celo estis, ke Esperanto malfermu vojon al la ĉirkaŭa mondo en la formo de ekspozicio, kaj informu la civilulojn pri nia Esperanto-vivo.

La Civila Domo en la kvartalo Zugló de Budapeŝto certigis la lokon por la realigo de lia revo. Dum la inaŭguro de la ekspozicio la direktoro de la Domo D-ro Péter Dömény salutis la partoprenantojn, kaj poste D-ro György Nanovfszky, emerita ambasadoro, honora prezidanto de HEA, la ĉefpatrono de la aranĝaĵo klarigis la titolon de la ekspozicio „La kontakto de Esperanto kaj la Arto”. Laŭ lia opinio, pluraj partoj de la arto



Partoprenantoj de la inaŭguro de la ekspozicio

ĉeestas en la ekspozicio kune kun Esperanto: literaturo, belarto kaj muziko. Li diris, ke Esperanto estas pontolingvo en la tuta mondo. La arto anoncas striktan interrilaton de la nacioj, kaj ĝi proksimigas la homojn unu al la alia. Li malfermis la aranĝaĵon kun la devizo de Mária Eszes prezidantino de la Hungaria Esperanto-Asocio: „En la silento

de nia animo estas *literaturo*, en nia imaga mondo estas *penrarto*, en nia koro fontas *muziko*, viviganto de nia vivo estas *Esperanto kaj arto*”.

La artistoj kune diskutas iliajn spertojn esperantlingve, kaj ili interŝanĝas la pensojn.

La organizanto de la aranĝaĵo János Nagy prezentis la partoprenantojn de la grupa ekspozicio, kaj donacis al ili esperantajn memoraĵojn. Li prezentis la relikvojn, fakajn publikaĵojn, universitatajn notojn de D-ro György Nanovfszky; la vojaĝlibrojn, kulturajn kaj movadajn librojn de D-ro Gábor Márkus, honora prezidanto de HEA, prezidanto de Eŭrazia Kultura Centro; la relikvojn de Sándor Jakab; la pentrarton kaj relikvojn de D-ro István Hegyi infankuracisto; la akrilajn kaj premiitajn oleajn pentraĵojn, silkan pentrarton, grafikaĵojn, la fajrajn klozoneojn de Esperanta Belarta Grupo en urbo Tata, kies gvidanto estas Erzsébet Ködmön; la bravure figuritajn ŝtonetgrafikaĵojn de Orsika Kiss.

Poste Maria Eszes prezentis la plej junan, talentan, kreivan kreinton Mandula Csilla Khern, kiu partoprenas en la ekspozicio kun siaj grafikaĵoj kaj pentraĵoj. Ŝi prezentis ankaŭ sian dancan arton pere de komputilo.

La 50 jarojn de Esperanto-vivo, literaturajn verkojn kaj pentrarton de Maria Eszes vidigis sia ekspozicio, kies titolo estis: „Kun plumo, melodio kaj peniko”. Ŝi estas ankaŭ la prezidantino de la Arta Rondo en urbo Pécs, kaj ŝi prezentis la prezidanton de la Societo Respekto al urbo Komló Zoltán Jégl, kiu kore salutis la partoprenantojn en la nomo de lia societo.



János Nagy prezentas la ekspozicion

János Nagy salutis la ekspoziciantojn kaj transdonis por ili donacojn de HEA. Li dankis al la gastigantoj, D-ro Péter Dömény kaj Anikó Sokácz, ĉefkonsilantino de Aŭtonomio Zugló, ke HEA ricevis eblecon prezenti siajn talentajn esperantistajn artistojn, kaj informi la civilulojn


pri nia riĉa historia Esperanto-vivo. Li donacis por la Civila Domo de Zugló pentraĵon senditan fare de la Belarta Esperanto-Grupo de Tata.

La ĉambrokoruso FŐNIX de la Societo Respekto al urbo Komló kantis la inaŭgurajn kantojn esperantlingve kaj hungarlingve. La ĥorestrino estis S-ino Gabriella Cs. Gillich.

Por prezenti la lingvon Esperanto Maria Eszes laŭtlegis la poemon de Sándor Petőfi: „Ĉardo ĉe la vilaĝlimo” en ensperantlingva traduko de Kálmán Kalocsay .

Dum la vespera programo oni povis aŭskulti la valoran prelegon de D-ro Gábor Márkus. La akustika programo de aktoraro EMI el urbo Komló prezentis en formo de kanto la poemon de Maria Eszes „La flamo de amo”. Oni ĝoje aŭskultis ankaŭ la kantartiston S-ron Attila Papp. Dum la programo la plurlingve kantanta koruso kantis japanlingve pri „Jacugatake-Esperanto-domo”. La kanton verkis S-ro Hori Jasuo el Tokio, honora membro de UEA. Ĉi tiu kanto sonis je la estimo de D-ro Gábor Márkus, kiu estas la amiko de la aŭtoro.

La kantistino Anjo Amika, ĝojigis nin kun bela, esperantlingva kanto „Pacon, esperon”. La iomete longan kaj interesan programon fermis kutima lotumado de la vere valoraj donacoj ofertitaj fare de la ekspoziciantoj. Por ni estis surprizo, ĉar nin helpis Dávid Borsányi, kiu havas nur 4 jarojn, kaj fine li diris recitaĵon esperantlingve. Poste la partoprenantoj kune kun la koruso FŐNIX kantis la konatan kanton „Vent’ printempa



La pentrajportreto de Zamenhof

kirlas akvon”, kiun kantis ankaŭ 50 membroj de la Societo Respekto al urbo Komló, kiuj alvenis al la ekspozicio.

En la nomo de la estraro, Mária Eszes dankis al János Nagy la eminentan organiza-don, kaj ankaŭ ŝi diris dankon al la estraro de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo: D-rino Julianna Farkas kaj D-ro Lajos Molnár, kiuj esperantigis kaj pretigis la informajn materi-alojn pri la kulturo de la

lingvo. Ŝi dankis la kunlaboron de la voĉteknikisto de la Civila Domo, la fotoartisto kaj

ĉiuj helpantoj. Ŝi rimarkis, ke: dan-kon al la aktoroj, kiuj plialtigis la nivelon de nia programo, kaj dan-kon al István Gulyás, prezidanto de la Hungara Fervojsita Espe-ranto-Asocio, ke li estis je nia dis-pono, kaj trans-donis por la eks-pozicio la pentraj-portreton de Ludo-viko Lazaro Za-menhof, kiun pent-ris S-ro Miklós Simonyi. Ni esperas, ke la enrigardo en nian Esperantan vivon estis utila kaj agrabla. Espereble tra la ekspozicio Esperanto pliproksimiĝis al la civiluloj .



Mária Eszes inter la partoprenantoj de la inaŭguro

lingvo. Ŝi dankis la kunlaboron de la voĉteknikisto de la Civila Domo, la fotoartisto kaj ĉiuj helpantoj. Ŝi rimarkis, ke: dan-kon al la aktoroj, kiuj plialtigis la nivelon de nia programo, kaj dan-kon al István Gulyás, prezidanto de la Hungara Fervojsita Espe-ranto-Asocio, ke li estis je nia dis-pono, kaj trans-donis por la eks-pozicio la pentraj-portreton de Ludo-viko Lazaro Za-menhof, kiun pent-ris S-ro Miklós Simonyi. Ni esperas, ke la enrigardo en nian Esperantan vivon estis utila kaj agrabla. Espereble tra la ekspozicio Esperanto pliproksimiĝis al la civiluloj .

Mária Eszes

ORIGINECA MONDO DE ALBANAJ FERVOJOJ



Malgraŭ ke Albanio estas unu el la plej malriĉaj eŭropaj landoj, ĝi fariĝas ĉiam pli ŝatata celo por turistoj. Albanio tamen konservas certan ekzotikan signon kaj neŝanĝeblan balkanan atmosferon. Malgraŭ ke ĝia registaro forte subtenas konstruadon de novaj ŝoseoj kaj rekonstruon de tiuj ekzistantaj, fervojo restas „cindrulino”, kaj iomete pli similas al bildoj el evoluantaj landoj. Ni provu iomete enrigardi tiun ĉi originecan mondon, kaj per malrapida vojaĝo provvojaĝu sur iliaj malbonstataj fervojlinioj.

Fervojan reton en Albanio oni komencis konstrui en la jaro 1917, tiam temis pri etŝpura linio destinita pliparte por transporto de krudaĵoj al urbo *Vlore*. Albana normalŝpura fervoja reto komencis aperadi nur post la dua mondmilito. La unua normalŝpura fervoja linio kunligis havenurbon *Durres* kun ĉefurbo *Tirana* nur en la jaro 1947, kaj komencis la transporton de personoj. En la 1980-aj jaroj estis konstruita relvojjinterligo al Montenegro, kaj la lando interligis sin al eŭropa fervojreto. Promesodonan evoluon de fervoja reto ĉesigis en la jaro 1990, kiam falis la komunisma reĝimo kaj konstruado de novaj linioj estis ĉesigita. Depost tiam ĉesis trafikado sur kelkaj jam ekspluatataj linioj. La nuntempa fervojreto atingas nur 447 km-jn, neniuj linioj estas elektrizita, kaj ĉiuj estas unutrakaj. La rapideco de la trajnoj varias inter 30 ĝis 50 km/h. Bone montras la situacion, ke surloke de la fervoja stacio en la ĉefurbo *Tirana* elkreskis nova urba bulvarado, pro tio *Tirana* tute ne havas rektan kunligon kun la fervojo. La trajnoj finas en *Kaŝor*, 7 km-j de *Tirana*. Rezulte vojaĝi sur apude iranta ŝoseo estas pli rapida kaj sen veturŝanĝo.



Nia trajno ie en Albanio

Al fervojhobiuloj Albanio estas bone konata danke al sia lokomotivstoko de reuzeblaj lokomotivoj, ekzemple de la ĉeĥaj „Burdoj” serioj T 669.1. Al la lando estis liveritaj entute 62 veturiloj de ĉi tiu serio, 19 restas ankoraŭ daŭre ekspluatataj. Vagonstoko estas kreita ekskluzive de reuzeblaj vagonoj, ricevataj el okcidenteŭropaj landoj, kiuj en ĉi tieaj kondiĉoj kaj (ne)bontenado ordinare eltenas nur kelkajn jarojn kaj estas anstataŭataj de pli novaj ankoraŭ reuzeblaj vagonoj. Nuntempe dominas germanaj vagonoj kun trionaj enirejoj ricevataj de Deutsche Bahn.

Nia unua interkonatiĝo kun albanaj fervojoj.

Unue ni bezonis informiĝi, kiam kaj ĉu trafikaj trajnkunligo al *Durres*. Tempo de tempo ja okazas, ke pro malfruiĝinta pago por nafto trajnoj kelkajn tagojn tute ne trafikis. Eĉ alitempe lokomotivistoj estas provizataj de nafto nur en kvanto por priservi veturon tien-reen, por ke estu malebligita pli frue ofte okazantaj ŝtelaĵoj. Ni bonŝancis kaj laŭ

alguita horaro eksciis, ke tuj ĉi matene la trajno foriros. Mi komencis fotografi, sed tio ne plaĉis al manovristo, li kelkfoje mansignis kion mi do faris. Ne, ke li kontraŭstaru fotografadon pli supozeble li rigardis min kiel frenezulon.

Matene ni aĉetis biletojn, vendataj en alstrata biletgiĉeto. Ili estis malmultekostaj ankaŭ laŭ albanaj cirkonstancoj, 72 km laŭ trakalkulo ĉirkaŭ unu eŭro. Ne estas dubo, ke trajnoj tie plenumas socialan servon por tiuj plej malriĉaj, kiuj pretas por malalta prezo toleri ankaŭ malaltan kvaliton. Ĉi tieaj biletoj estas karakterizaj ankaŭ de sia motivo – dizellokomotivo „Burdo” kaj ĉinaj pasaĝervagonoj, kiuj ĉi tien iam estis liverataj.

Nuntempe ili jam estis ĉiuj maŝinistitaj. Nia trajno konsistis el lokomotivo kaj du germanaj vagonoj, kiujn la personalo unue trainspektis kun baterio-lumigilo. Post kelkvara trafikado ili tre mizeraspektis, germana teknologio en ĉi tieaj kondiĉoj tute ne konvenis. Ŝtofaj sidiloj estis ĉifitaj, la vagonoj kompreneble nek hejtis, nek lumis. Loka



La rapideco estas 30 km/h

nacia sporto estas ĵetado de objektoj al fenestroj de la veturanta trajno, tial ĉiuj fenestroj estis vitrorompitaj kaj plenaj de araneaĵoj, en la enirpordoj ofte mankas vitroj.

Vojaĝantoj ne estis tre multaj, ni havis por ni dispone tutan lastan trionon de la pasaĝervagono, el kiu ni povis dumveture trajnobservi la linion. Mia amiko lasis pakpaperon de bakitaĵo apude sur la sidilo (korboj mankis), tuj aliris trajnkompanistino, kaj la pape-ron zorgeme prenis kaj elfetis tra la fenestro. La sinjorino trajnkompanistino prenis rolon

de nia protektantino, kaj ĉiun, kiu deziris sidiĝi en nia kupeo, transŝovigis al aliaj. Unu junulo tamen estis malcedema kaj komencis krii, kio finiĝis per kapitulacio de la akompanistino. Krome la akompanistoj en albanaj fervojoj estas solaj, kiuj portas almenaŭ duonindikon de la uniformo - bluan antaŭtukon – ĉiuj ceteraj estas civilvestitaj.

Aventuro komencis

En *Durres* ni havis kvar horojn da libertempo antaŭ ol ni daŭrigis la vojon pli norden al *Shakoder*. En la stacidomo de la granda atendejo estis pura kaj tute senbezona, same kiel la kajo estis post al- kaj forveturo de la trajnoj ŝlosfermata. Nia trajno denove estis kunmetita de lokomotivo kaj du pasaĝervagonoj. Tiu malantaŭa estas slosfermita, kaj la akompanistino nin direktis al la antaŭa vagono. Dume ĝenis nin grupo da ciganoj. Tiuj tamen estis fare de la personalo tuj forpeltitaj. Por ili estis destinita la dua vagono, respektive ĝia triono, kiu estis malŝlosita, kaj la ciganoj povis envagoniĝi. Kompreneble neniu emis veni al ili, kaj se ili provis trairi en la unuan vagonon ili estis rapide forpeltitaj. Estas tamen bezonata aldoni, ke ili rapide komencis detruadi la vagonon se tio estis en ĝia stato ankoraŭ ebla. Bedaŭrinde la fenestro en nia kupeo estis malfermeblaj. La trajno pleniĝis kaj estis plene okupita, kaj kvazaŭ spite al tio estis vitroj de eniraj pordoj ankoraŭ nedifektitaj, senvitra estis nur unu. Apud ĝi amasiĝis la fumantoj, kun kiuj mi interpuŝiĝis lokon por foti.

Precipe nerapidi

Sekvis la veturo per malrapida tempo norden, ja 106 km-jn ni veturis en iom malpli ol kvar horoj. Ni nenie haltis pli longe, kaj ne estis bezonata ie trajnkruciĝi. Ni dokumentis staciojn de tiuj bontenadaj ĝis tiuj ruinaj. En multaj stacioj, precipe en tiuj el la 1950-aj jaroj, estas trafikoficejo situata en la unuan etaĝon, origine kun aliro sur rondira ŝtala ŝtuparo, apoganta sin al muro de la stacidomo. Paranoidaj albanaj kompartianoj verŝajne planis ĉi tiun ŝtuparon forigi en kazo de okupacio, kaj bari tiel aliron de potenciala malamiko al la trafikgvidanto.

En la trajno estis multaj avertaj anoncoj – instigaj konservi purecon kaj ordon, malpermeso uzadi alkoholaĵojn kaj narkotaĵojn, aŭ avertas pri monpuno 500 Lek (ĉirkaŭ 4 eŭroj) pro veturo senbileta. Tiu ĉi puno tamen estas multe malpli ol anoncas origina germana averto postulanta 40 eŭrojn. La trajnakompanistino pro la proksimiĝanta finstacio komencis



reordigi la veturilojn. Komence per balailo, per kiu jam oni balais sur stratoj, ŝi zorgeme balais ĉiujn forĵetaĵojn (alumetojn, cigaredstumpojn, pakumaĵojn, ŝelojn de semoj kaj similajn), ĝis la unua interveturila transirejo, kaj elŝutis balaaĵojn rekte al reloj. Poste ŝi alportas kuveton kun akvo, kaj ĉiuj vojaĝantoj metis la piedojn sur la sidiloj, kaj la akompanistino per frotviŝilo frotviŝis la koridorojn inkluzive la necesejon. Pasiaj fumantoj malgraŭ tio daŭrigis la cigaredfumon, pro tio la enirkoridoro denove plenis kun malpuraĵoj. Sed

tiam jam sufiĉis malfermi la pordon kaj per balailo forigi malpuraĵojn eksteren. Antaŭ la halto de Shkoder lokaj junuloj malfermis la pordojn kaj plenumis la vagonon, poste ili elsaltis antaŭ la trajnhalto. Unu knabo rezulte vundigis sian genuon, kaj kiam la trajno haltis la kondukistino pridemandis lin pri la difekto, kaj post kelkaj vangofrapoj al li, ŝi komencis flegi lian genuon. Tio estis vere amuza situacio, sed komencis la lokomotivcirkulo por ŝanĝi trajndirekton. La lokomotivo „Burdo” apenaŭ estis malkuplita, la junuloj alkuris por ensalti sur ĝin.

Al la helpkondukisto tio tute ne plaĉis kaj tuj komencis surŝpruci lin per akvo el plasta botelo. La junuloj rezignis, kaj la lokomotivo ĉirkaŭveturis sen ili.

Venontan tagon ni iris por rigardi la alvenon de la trajno. La lokomotivisto kun la helpanto estis ĝentilaj, kaj sur frunta ĉirkaŭirejo de la lokomotivo dum manovra ĉirkaŭveturo ili permesis veturi al kelkaj puberiĝuloj. Dum la inspekto de la lokomotivo ni rimarkis la krevitan hoson en boĝio. Iomete siblis el ĝi aero, pro tio eble la boĝio malbone bremsis. Sed tio pro la malalta rapideco ne ĝenis.

Albanajn fervojojn en *Shkoder* ni forlasis, sed ne Albanion, kiu proponis multajn naturajn kaj kulturajn memoraĵojn. Ekzemple proksime de Shkoder etendiĝas akvorezervejo *Koman*, kiu proponis ravajn ŝipekskursojn. La ĉirkaŭaj montoj ĝis altoj 2500 metroj super maro estas ŝatata celo por ŝatantoj de la sovaĝa naturo. En Albanio ĉiukaze estas kontentaj tiuj homoj, kiuj ne deziras travivi libertempon en hotelkompleksoj, sed deziras travivi aventurojn kaj romantikon. Malgraŭ la multaj negativaj spertoj, tamen nia vojaĝo per la albana fervojo estis ege interesa.

Notis: **Jindrich Tomiŝek**

TRAJNVOJAĜO EN KROATIO

Mi legis la numeron 1/2019 de la faka revuo Hungara Fervoja Mondo (HFM). Kaj la enhavo, kaj la aspekto de tiu revuo ege plaĉas al mi, pro tio mi decidis pretigi artikolon al la revuo. Miaj ŝatataj temoj estas la naturprotektado, vojaĝado kaj la spirita vivo. Ĉar tiu revuo estas fervoja fakrevuo, mi skribas pri trajnvojaĝo de la kroata ĉefurbo Zagrebo al mia naskiĝloko Lepoglava. Momente mi loĝas en Sesevete, kaj de tie mi startis al Lepoglava, pri kio mi raportas mian aventuron.

Mi decidis fari la vojaĝon dum labortago, ĉar sabate kaj speciale dimanĉe la trajnoj trafikis rare. Laŭ la veterprognozo por la elektita tago montris belegan veteron por la vojaĝo. Dum la nokto antaŭ la vojaĝo mi ne dormis bone, kvankam mi eĉ prenis du tablodojn por la trankviliĝo. La ekscitiĝo estis grandega pro la vojaĝo trajne, ĉar mi faris tion la unuan fojon post kvindek jaroj.

Kvankam de Sesevete ĝis la ĉefa stacidomo Zagrebo trafikis trajnoj, tamen mi veturis tien buse kaj trame, en kiu la veturdaŭro estis unu horo. Mi alvenis al la ĉefa stacidomo antaŭ duonhoro de la ekveturo de mia trajno al Varazdin. Mi tuj aĉetis bileton ĝis Lepoglava, kaj direktis al la trajno. Ĝi estis malnova trajno per lokomotivo kun du 312 ĉevalpovaj motoroj. La trajno ene estis agrabla, bone purigita per rembunitaj sidlokoj. Ĝi trafikis per 45, 60 kaj 80 km/h rapideco, depende de la kvalito de la reloj. Ĝis Varazdin mi vojaĝis ĉ. 2,5 horojn, ĉar tiu fervojlinio nun havas rekontruadon. Post la rekonstrua laboro la trajnvojaĝo povos daŭrigi pr. unu horon. En la vagono veturis nur ok personoj, kvankam la vagono enhavas 30 sidlokojn. Alveninte al Varazdin mi devis transiri al alia trajno, kiu trafikis al mia naskiĝloko. Ĉar mi devis atendi 20 minutojn, mi parolis kun la lokomotivestro, kiu diris, ke la lokomotivon la Kroata Fervojo aĉetis el Svedujo. La lokomotivo havas du motorojn, kiuj havas po 450 ĉevalpovojn. La rapideco de tiu trajno estas 120 km/h. La vagono havas 68 sidlokojn, en kiu vojaĝis nur 13 vojaĝantoj. Post duonhoro ni atingis mian naskiĝlokon. Kiam mi lernis en Varazdin, tiu vojaĝtempo estis unu horo, ĉar la statoj de la reloj estis malbonaj, la trajnoj ofte misfunkciis pro altaj aŭ malaltaj temperaturoj.

Se oni mencias la nomon Lepoglava, ĝi plej ofte asocias pri la malliberejo en tiu urbo, kiu en 2020 festos sian 620-jaran datrevenon. La ĉefan meriton pri ĝia longa ekzisto havas la paŭlanoj. Lepoglava estas lulilo de la scienco, arto kaj kulturo, disvastigitaj de la paŭlanoj ekde la jaro 1400. La urbo havas la statuson de la unua kroata universitato. En la urbo troveblas la komplekso de la iama paŭlana monaĥejo, kiu konsistas el granda konstruaĵo kun la interna korto kaj portiko. La suda flanko estas konstruita preĝejo de la Senpeka Koncipiĝo de la Beata Virgulino Maria. Fama estas la puntofarado en la urbo kaj la internacia punto-festivalo. Multaj aliaj vidindaĵoj troveblas ankoraŭ en ĉi tiu urbo. Mi promenadis kelkajn horojn en la urbo rigardante la antaŭlonge viditajn stratojn, placojn, konstruaĵojn k.a.

La revojaĝo al mia loĝloko okazis egalritme kun pli da vojaĝantoj. Malgraŭ ĉio mi rekomendas veturi per trajno en la lando, eĉ eksterlande, ĉar tiel ni malmulte malpurigas la naturon. Laŭ la statistikoj la aŭtomobiloj estas la plej malpurigantaj trafikiloj, eĉ ankaŭ la aviadiloj estas pli malpurigaj ol la fervojo. Mi deziras al ĉiuj agrablajn vojaĝadojn per fervojo.

Marijan Benc

KVINDEK JAROJ DE BUDAPEŝTA MEDICINA ESPERANTO-FAKGRUPO

La Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo fondiĝis la 2-an de marto 1969. En marto de 2019 la Fakgrupo festis la 50-an naskiĝtagon. Depost nia fondiĝo la ĉefa celo de nia Fakgrupo estis la scienca, medicina aplikado de la Internacia Lingvo, ĉar laŭ nia forta konvinko la scienco nepre bezonas justan, neŭtralan, komunan lingvon certigantan veran lingvan egalrajtecon por ĉiuj scienculoj. La unuajn jarojn de nia agado ni dediĉis al la lingvolernado. Ni traripetis la tutan lernolibron de Julio Baghy. Iom post iom nia membraro akiris la deziratan lingvan nivelon. Jam en la jaro 1969 aperis niaj unuaj artikoloj en la cirkulero „Medicinistaj Novaĵoj”, redaktita de d-ro Jozefo Hradil, en la tiama Ĉeĥoslovakio. Depost marto de 1969 nia Fakgrupo kunvenis, kaj ankaŭ nun kunvenas – escepte de aŭgusto – ĉiun unuan labortagan merkredon de ĉiu monato. Tio signifas, ke ni organizis ĝis nun jam pli ol 500 kunvenojn.

En la jaro 1971 ni la unuan fojon organizis Esperanto-lingvokurson por kuracistoj kaj flegistinoj sub gvidado de d-rino Károlyné Nanovfszky en la Budapeŝta Hospitalo László.



*Julianna kaj Lajos kun Aleks Kadar ĝenerala
sekretario de UEA en Budapeŝto*

En 1972 fondiĝis la Hungara Sekcio de la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), kies afergvida prezidanto fariĝis d-ro Imre Ferenczy, kaj ni elektis d-ron István Hegyi, kiel lingvan konsilanton de la gvidantaro.

Ekde la jaro 1973 la sciencaj agadoj evoluis, kaj en novembro ni aranĝis nian unuan sciencon vesperon kun esperantlingvaj prelegoj. Dum la ceteraj kunvenoj d-rino Julianna Farkas laŭlegadis detalojn el la „Lernolibro pri oftalmologio” de la japana profesoro d-ro Seiči Kato. La tekston tradukis hungaren d-ro

Lajos Molnár, kaj klarigis al la aŭskultantaro. Ekde tiu tempo la partoprenantoj legis esperantlingve kaj tradukis hungaren la ĉapitron de la popularscienca verko de Alberto Fernandez „Senĝenaj Dialogoj”. Sekve tio la ĉeestantoj povis akiri interesajn konojn, kaj samtempe ni ĉiuj povis alproprigi abundan sciencon vortrezoron.

Ekde 1974 ni jam regule organizis sciencajn prelegseriojn en niaj kunvenoj, kaj ni partoprenis en la redaktado de plurlingva „Sanitar-Ekonomia Vortaro”, kiam ni povis kunlabori kun profesoro d-ro Kálmán Kalocsay.

Ekde la jaro 1975 ni regule kunlaboris kun profesoro d-ro Ottó Haszpra en redaktado de la „Sciencaj Komunikadoj”, la bonega aldono de la revuo „Budapeŝta Informilo”. Ni aperigis plurajn hungarlingvajn artikolojn en revuoj kaj gazetoj pri Esperanto.

En 1976 aperis nia scienca artikolo „Variĉelo de infanoj kuracitaj de kortikosteroidoj kaj imunsubpremantaj medikamentoj” en la „Medicina Internacia Revuo. La artikolo gajnis arĝentan memormedalon de la UMEA Shinoda-Premio.

En 1977 ni partoprenis la 1-an Internacian Medicinan Esperanto-Konferencon (IMEK) en Krakovo. Okaze de tiu konferenco ni interkonatiĝis kun d-ro Wlodzimierz Opoka, kiu tiutempe estis universitata studento. Li estis la ĉefa motoro de la konferenco. Fine de la konferenco kvar hungaraj medicinistoj ricevis de la rektoro de Krakova Medicina Akademio memormedalon „Nikolao Kopernik”.

Je la iniciato de Miklós Láng, teknika redaktoro de la hungara revuo „Gyógyszerészet” (Farmacio) en 1978 ni komencis sisteme esperantigi la resumojn de la tie aperantaj sciencaj artikoloj. Helpe de Istvánné Jenővári, la tiama redaktorino de la semajnrevuo „Orvosegyetem” (Medicina Universitato) ni komencis prezenti Esperanton por la studentoj de la Budapeŝta Medicina Universitato Semmelweis. D-rino Judit Boros verkis plurajn artikolojn por tiu revuo, kaj ŝi interpretis hungaren esperantlingvan prelegon de nederlanda profesoro pri nukleaj medicinaj aparatoj.

Somere en 1979 okazis en urbo Hódmezővásárhely la 2-a IMEK. Katalin Faragó, bibliotekistino de la Urba Hospitalo, brile organizis la konferencon, kiun partoprenis 150 kuracistoj, apotekistoj, flegistinoj kaj veterinaroj el ok landoj de Eŭropo. Okazis 35 esperantlingvaj, sciencaj prelegoj, kiun prelegserion kunordigis nia Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo.

En la jaro 1980 ni fondis la „Memormedalon Zamenhof de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo”. Ĝis nun 28 eminentaj, poresperantaj agantoj ricevis tiun ĉi medalon kreitan de Sándor Józszai belartisto. Komence de la 80-aj jaroj Józsefné Farkas-Tatár gvidis grandsukcesan Esperanto-lingvokurson por medicinistoj en la hungara Ministerio pri Sano.



Partoprenantoj de la 19-a IMEK en Budapeŝto

Inter la jaroj 1983 kaj 1985 kelkaj membroj de nia Fakgrupo – inter ili d-ro Miklós Fehér, d-ro Balázs Szemők kaj d-ro Lajos Molnár – kolektis la anatomiajn, farmaciajn, medicinajn, veterinajn, stomatologiajn kaj dento-teknikajn fakesprimojn por la Hungara-Esperanto Meza Vortaro.

En la jaroj 1989-1990 okazis re-ĝimŝanĝo en Hungario, kio ne tro favoris la Esperantomovadon. Pluraj Esperantokluboj malaperis. En tiu ĉi malfacila periodo aliĝis al nia Fakgrupo János Sárközi,

fizikisto, eminenta esperantisto kaj arttradukisto, kiu ĝis sia morto riĉigis niajn programojn. Li tradukis esperanten la utilan kajeron „Laborant-protektado antaŭ la ekrano” Samtempe Kornélia Nagy instruistino pri gimnastiko kaj Klára Szabó naturterapiistino fidele helpis nin teni en vivo la fakgrupon.

Ni dankas al Thierry Salomon pro la helpo alproprigi de bazaj konoj de uzado de nia unua komputilo en la jaro 2000. Li pretigis la unuan retejon de nia fakgrupo.

En 2001 dum la Zagreba Universala Kongreso kolektive ni ricevis la memormedalon de UMEA Shinoda-Premio.

Inter la jaroj 2002-2004 ni verkis kaj eldonis hungarlingvan kajeron „Kaj ankoraŭ kial utilas por mi Esperanto”, eĉ ni partoprenis en la redaktado de la periodaĵo Eŭropa Unio kaj la „Lingva Demando”. En tiuj agadoj helpis nin Oszkár Princz kaj kelkaj eminentaj

esperantistoj. Tre aktive partoprenis en nia agado d-ro Endre Dudich, István Mészáros, László Gados, d-ro Balázs Wacha, d-ro Gyula Kulcsár k.a.

En 2006 d-ro Lajos Molnár kaj d-rino Julianna Farkas fondis la „Internacian Laborgrupon por Antaŭenigi la Lernejan Instruadon de Esperanto”, kies laboron apogas du retejoj kaj aparta interreta diskutlisto kun pli ol 200 partoprenantoj el 40 landoj. D-rino Katalin Kováts redaktas tiun grandiozan retejon.



Vizito en hospitalo de Opava dum la 18-a IMEK

La 4-an de marto 2009 ni solene festis la 40-an naskiĝtagon de nia Fakgrupo, kiam András Lukács, la gvidanto de la Medioprotekta Laborgrupo Aero parolis pri ilia aktiveco kaj pri siaj malnovaj kontaktoj kun Esperanto. Dum la jaroj de la tutmonda, socia-ekonomia krizo ni pensis, ke nia agado servu la sanon en ĝia plej vasta senco, kiel korpan, animan kaj socian harmonion. Dum niaj sistemaj monataj kunvenoj, diskutrondoj, spiritaj metiejoj regule okazas prelegoj pri sanprotektado: muziko-terapio, naturkuracado, ĉiutaga diverstipa gimnastiko, lingvaj ekskursoj, Yumeiho-terapio, mensa trejnado ktp.

Ekde 2010 ni funkciigas novan diskutliston por helpi la agadon de UMEA. En aŭgusto de 2010 ni aperigis la unuan artikolon en la Esperanta Vikipedio.

En 2012 d-ro Lajos Molnár kaj d-rino Julianna Farkas pretigis la paralelan, hungaran-esperantan version de la nova Fundamenta Leĝo de Hungario. Pluraj membroj de nia Fakgrupo aktive partoprenas la redaktadon de la interreta frazokolektaĵo „TATOEBA”, kie Esperanto en 2012 okupis jam la duan lokon inter pr. 200 lingvoj.

En 2014 okazis en Budapeŝto la 19-a UMEA-kongreso, kies ĉeforganizanto estis Katalin Faragó, János Nagy vicprezidanto de la Hungaria Esperanto-Asocio kaj profesoro d-ro Włodzimierz Opoka ĝenerala sekretario de UMEA. Kompreneble ankaŭ la membraro de nia Fakgrupo entuziasme helpis la organizantojn.

En la kuranta jaro ni digne festis nian 50-an datrevenon, kaj ni decidis, ke tiun gravan kaj entuziasman Esperanto-agadon kune kun nia membraro ni dŭrigos.

D-ro Lajos Molnár kaj d-rino Julianna Farkas

Rimarko de la redaktoro:

Traleĝi, eĉ plurfoje relegi tiun vivvojon de tiu Fakgrupo, mi rimarkas, ke estus bona afero, se Hungario eĉ la tuta mondo havus tiujn aktivajn kaj entuziasmajn membrojn en la kadro de la Esperanto-movado. Per tiuj agadoj la Esperanto plu evoluos eĉ disvolviĝos ne nur en Hungario, sed en la mondo. Mi elkore gratulas al la du motoroj de tiu ĉi Fakgrupo, Julianna kaj Lajos, kaj mi deziras al ili kaj al la tuta medicina esperantistaro pluajn sukcesojn kaj rezultojn.

István Gulyás
redaktoro de HFM



La statuo de taŭro antaŭ la toreejo

**Transponta Esperanto-Kongreso
germana - pola - fervojista**



**Frankfurt (O) / Słubice
29-a de Majo – 5-a de Junio 2020**



**La 72-a kongreso de IFEF okazos de la 29-a de majo
ĝis la 5-a de junio 2020 en la germana urbo Frankfurt (O)
kaj en la pola urbo Słubice
Informojn oni povas ricevi de la Hungara Fervojista
Esperanto-Asocio**